4-a Jaro. N-o 198 APERAS SEMAJNE 19. Julio 1928



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

Kiel aspektas en Ĉinio la virina movado

La aŭtorino de tiu ĉi artikolo, K-dino Agné Ĉen, estas unu el la reprezentantoj, kiuj batalas por homrajtoj en revolucia Ĉinio. Kvankam ŝi estas ankoraŭ tre juna, 22-jara, ŝi jam estas fama verkintino de multaj poemoj, noveloj, prozo ktp., inter kiuj plej interesaj estas "La laca vagadanto" kaj "La koro de herboj". Ŝi nun vojaĝas en Francio por studi kaj verkadi. Ĉi tiu artikolo estas speciale verkita por "S-ulo" en franca lingvo kaj tradukita de ni.
Red.

Se ni konsentas, ke la intereso de la virino ankaŭ estas tiu de l' laboristo, ni ne povas havi ian dubon nek malkomprenemon pri la aktiveco kaj granda penado, kiun nuntempe faras la virinoj en Ĉinio. Ni eĉ devas helpi al ili kun fervoro. Ilia penado ja koncernas la ĝeneralajn rajtojn de l' homaro, ne ununure tiujn de l' virinoj.

Inter la virinoj de l' diversaj landoj okupas la ĉinaj virinoj tute specialan pozicion. Longtempe katenitaj per la formalaĵoj de l' ritoj, kaptitoj de malnovaj moroj kaj tradicioj, ili fariĝis senpova kaj senvola ludilo de l' okazantaĵoj kaj iom post iom objekto de malestimo. Ili ne plu estas homaj estaĵoj en la socio, nek patrinoj nek edzinoj en la familio. Kial? Ĉar en Ĉinio regas la reĝimo de la granda familio kiel ĉe la antikvaj romanoj. La edzeco ne estas bazita sur la geedza amo. Por havi bofilinon, la gepatroj okupas sin pri la fianĉiĝo de siaj filoj. Por havi infanojn, al kiuj transiras la heredaj rajtoj, la viro prenas edzinon. La virino estas nur objekto. Ŝi neniam estas sendependa.

Longan tempon la ĉinaj virinoj estis submetitaj al tiu ĉi stato. Sed fine, lastatempe, ili levis la kapon. Havantaj eksterordinaran paciencon, kiu estas propra al la orientanoj, ili elportas ĉiujn suferojn kvazaŭ spongo, kiu absorbas la akvon malrapide, senĉese, sen kontraŭstaremo. Sed alvenas tago, kiam ili per potenca kaj energia reago leviĝas por akiri rajtojn. Ne estas bezonate



diskuti pri tiu ĉi decido, kies spirito povas esti konsiderata kiel la bazo de l' hodiaŭa virinmovado en Ĉinio.

La hodiaŭaj ĉinaj virinoj estas absolute decidemaj pretendi kun firmeco la rajtojn ne sole por la virino, sed ĝenerale por la homoj. Ĉar longa malgaja pasinteco kaj spertoj je iliaj kostoj akiritaj vigligas kaj kuraĝigas ilin. Komence ili luktis kontraŭ la ritaj formalaĵoj. Tiam ili postulis la forigon de l' heredrajto precipe kiel vira privilegio, la saman edukadon por viroj kaj virinoj, la sendependecon virinan en plenumo de ilia profesio kaj liberecon de la laboro. Ili organizis diversajn societojn. Ili multe klopodis por atingi la aspiratajn celojn. Sed kiel rezulto: nenio, aŭ proksimume nenio el la dezirato... De tiam ili scias, ke oni devas vidi la grandajn liniojn por solvi grandan problemon, ke, tieldire, estas senutile voli sole la rajtojn virinajn, sed ke necesas postuli la tutajn homrajtojn.

Ekzistas du opinioj ĉe la ĉinaj virinoj por trudakiri siajn rajtojn. Unu volas apliki politikan proceson, la alia ekonomian kaj profesian procedojn.

Por la unua, la virinoj akirinte iam la potencon, povas per sia influo liberigi la aliajn subprematajn samsortulinojn. Oni riproĉas al tiu ĉi opinio tro respekti la individuan forton. Plue, ne ekzistas nun virinoj, kiuj ludas gravan rolon en politika konsidero. Eĉ se ekzistas unu, oni tre timas, ke ŝi povus fariĝi politika spekulaciisto aŭ eĉ militaristo kiel Ĉang-solin aŭ Hu-pej-fu. Tial oni ne povas konsenti tiun ĉi opinion.

La dua kompreneble estas malpli limiganta. Sed ekzistas virinoj havantaj specialan talenton kiel literaturistoj aŭ scienculoj, kiuj ne povas esti limigataj al la plenumo de profesio aŭ al manlaboro.

Depost nelonge en Ĉinio disvolviĝas ĉie kvanto da virin-asocioj: profesiaj, edukaj, politikaj, asocioj koncernantaj la emancipon de la virino. Freŝdate, dum la nacia armeo antaŭeniris al nordo, la laboristinoj ankaŭ trapasis la batalkampojn, pretaj verŝi sian sangon por depostuli liberecon kaj homrajtojn. Multaj studentinoj organizis helpgrupojn por vunditoj kaj antaŭeniĝis ĝis

la avangardo de l' nacia armeo. Ĉio tio nin kredigas pli ol iam je la grandeco de l' ĉinaj virinoj, je ilia nobla pensado kaj je iliaj heroaj agoj. Ili pruvis al ni, ke ili estas same tiel kapablaj kiel la viroj.

Hodiaŭ Ĉinio trairas periodon de rapidaj fortoŝanĝoj. La popolamasoj, la proletoj, leviĝas kontraŭ la kapitalistoj kaj militaristoj postulante sian ĉiutagan panon. Dume la ĉinaj virinoj, ili ankaŭ, metas sin antaŭ la virojn por depostuli siajn rajtojn kaj siajn vivrimedojn.

Ni estas konvinkitaj, ke en proksima estonto, kiam la periodo de malordo estos pasinta, kiam ĉio denove ordiĝos, la ĉinaj virinoj povos atingi la plej brilan sukceson en la virina movado de l' tuta mondo.

A. Ĉen, speciala korespondantino de l' internacia Agentejo, Ŝanĥajo.

EL AMERIKO

Lastatempe aperis en "S-ulo" artikolo el Svedio pri striko en la fabriko aŭtomobila en Stokholmo de granda usona kompanio. La estro de tiu kompanio diris al la strikantoj, ke ili devas tuj rekomenci la laboron aŭ li fermos la fabrikon, ke li povas fari la bezonatajn aŭtomobilojn en aliaj fabrikoj, kiujn la entrepreno posedas en Danio kaj Belgio. Tio elmontras frape, kiom da povo estas en la manoj de la usonaj kapitalistoj, bone organizitaj sur la ekonomia kampo de la tuta mondo. Ĝi ankaŭ montras, kiel estas neutile por la laboristoj organiziĝi laŭ siaj metioj kaj naciskale. Ĉiuj laboristoj en iu industrio devas organiziĝi en la sama organizo, nerigardante la laboriston laŭ sekso, kredo, nacieco aŭ la ilo, per kiu li gajnas la panon. La malnova metiunuiĝismo estas jam kaduka. Mi ĝojas, ke la eŭropaj laboristoj komencas kompreni tion. Por batali kontraŭ la moderna sennacieca kapitalismo, estas necese konstrui la novan, sciencan unuiĝismon. Estas necese fari tion tuj, aŭ eble pasos la oportuna tempo por ĉiam. Tiu nova unuiĝismo estas la Industria Unuiĝismo, kiel proponata daŭre dum la lastaj 23 jaroj de la Industriaj Laboristoj de la Mondo (I.W.W.). Ĝi ne estas nacia organizo. Ĝia ĉefsidejo estas en Ĉikago, sed ĝiaj anoj estas jam en ĉiuj partoj de la terglobo, eĉ en Aŭstralio, Kanado kaj Ĉilio. Ĉiulandaj esperantistaj laboristoj devas studi la temon kaj diskuti ĉiujn planojn por fortigi la klasbatalon favore al la Proletaro. La malamiko preparas novajn militojn, kaj laŭ mia opinio la laboristoj povos eviti tiun buĉadon nur per la Industria Unuiĝismo uzota tutmondskale.

* * *

En Los Angeles, Kalifornio, je la 2. marto 1928 mortis la 75-jara generalo Emilio Kosterlitzky. Li naskiĝis en Moskvo kaj pasigis sian tutan vivon portante armilojn kaj obeante ordonojn de du tiranoj, la caro Nikolao de Rusio kaj la tirana diktatoro Porfirio Diaz de Meksikio. Kosterlitzky ankaŭ servis tempeton en la usona armeo, sed baldaŭ li forlasis ĝin kaj eniris Meksikion, kie oni tiutempe bezonadis tian viron por helpi subpremi la suferantan popolon. Poste Kosterlitzky atingis esti la ĉefgeneralo de la nacia gvardio konata kiel "Los Rurales', kiu estis kampara rajdanta soldataro organizita speciale por "gardi la pacon" ekster la urboj. En 1903 mi vidis en la Ŝtato Sonora, Meksikio, Kosterlitzky. Tiam la ministoj kaj aliaj laboristoj multe malamis lin, ĉar li kaj liaj kozakoj, estis mortigintaj multajn meksikianojn. En la tempo de la revolucio, kiam ĝi venkis en 1911, Kosterlitzky kun multaj riĉuloj forkuris el Meksikio al Usono kaj poste loĝadis en Kalifornio, en la urbo de la milionuloj kaj la malriĉuloj. Tie li mortis.

* * *

Sur la insulo Mas Afuera, kiu estas proksimume mil kilometrojn malproksima de la okcidenta marbordo de Sud-Ameriko, suferas pli ol 50 politikaj malliberuloj. La nuntempa diktatoro de Ĉilio, Ibanes (elparolu: I-ban-jes) sendis ilin tien. Inter ili troviĝas socialistoj, anarkistoj, komunistoj kaj anoj de la Industriaj Laboristoj de la Mondo. Lastatempe 8 el ili riparis forlasitan malgrandan boataĉon, sekrete difektis la radian aparaton, kaj sukcese iris al la kontinento.

En Arizono

La sudokcidenta regiono de Usono estas plejparte dezerto, kaj oni rakontas multe pri la sekeco kaj terura varmego somere, kiuj ekzistas speciala en ŝtato Arizona. Oni diras, ke kulturita Nov-Jork-ano vizitis tiun ŝtaton unuafoje kaj post du-tri tagoj, iun vesperon en la hotelo, li diris: "Mi opinias ke Arizono ne estas tiel malbona kiel oni diras. Ĝi nur bezonas iom malpli da sablo, iom pli da pluvo kaj pli bonklasan popolon, kaj ĝi estus sufiĉe bona landparto." Apudstaranta Arizonano respondis: La infero bezonas nur la samon.

En Kolorado

Farmisto iris en arbaron portante pafilon sur la ŝultro kaj kondukante hundon per ŝnuro. En la momento, kiam li ĵus estis transpaŝinta la vojon antaŭ sia bieno, alvenis vojaĝanto en aŭtomobilo, kiu frapis kaj mortigis la hundon. Eble iom timante la pafilon, la vojaĝanto paŭzis, revenis kaj diris: Mi mortigis vian hundon. — Jes. — Ĉu ĝi estis valora hundo? — Ne tre valora, respondis la farmisto. — Ĉu estus bone, se mi pagus al vi dek dolarojn? — Jes, sinjoro . . . Forirante la vojaĝanto diris: Mi malĝojas, se mi nuligis vian ĉasadon. — Ho, tio ne gravas. Mi ne volis ĉasi, mi nur iris al la arbaro por mortpafi la hundon.

SAT-ano 1781.

La dramo de l' Norda Poluso

Post la katastrofo de l' "Italia" la gazetaro multe, preskaŭ ĉiutage, skribis pri la nord-polusa dramo. Tio daŭris ĝis la momento, en kiu la tre kara vivo de generalo Nobile estis savita. Nun ni vidas nur malgrandajn menciojn de tempo al tempo pri la provoj serĉi kaj trovi la novajn viktimojn por ĉiam perditajn pro savo al Nobile.

La polusa ekspedicio de Nobile kostis multajn milionojn da liroj, kiuj estas surŝarĝitaj nur al la laboristoj. Sed tio nenion ankoraŭ signifas apud la homaj vivoj perditaj, apud la doloro de multenombraj familioj pri tiuj, kiuj por ĉiam malaperis. La polusa ekspedicio de Nobile ne konsistis nur el Nobile kaj kelkaj oficiroj malsataj je gloro kaj mono. Sur la aerŝipo "Italia" troviĝis ankoraŭ multaj malfeliĉaj laboristoj, pri kiuj oni nun tute ne parolas.

La nobleco de generalo Nobile estas nun bone konata: kiel kapitano de vaporŝipo en danĝero, li devus resti la lasta sur sia respondeca loko. Sed li preferis savi la propran vivon kaj forkuri la unua, lasante la malfeliĉajn grave vunditajn homojn en morta danĝero. Homoj kiel Nobile ne timas la opinion kaj juĝon de la socio, ĉar ili bone scias, ke la nuna socio estas senanima.

Por savi la nord-polusan ekspedicion, la homaro faras ĉion eblan. La laboristoj de Milano estis la unuaj, kiuj preferis resti sen peco da pano, por doni ĉion por la nova help-ekspedicio. Tion ili ne faris por savi nur Nobile, sed por savi la laboristojn, kiuj okupis la plej humilajn kaj danĝerajn lokojn en la aerŝipo. Sed la fino de la tragedio ankoraŭ ne estas atingita. Ĉiutage kreskas la nombro de viktimoj. Baldaŭ denove generalo Nobile revenos Italion kovrita de gloraj laŭroj, kaj la itala societo forgesos la dolorajn larmojn de tiom da familioj, kiuj restis sen espero.

Jen la kapitalista solidareco, jen la viktimoj de la burĝa imperialismo. Ĝis kiam tio daŭros?

Ael.

Pri sufiĉe fama historia Manifesto

Kiam eksplodis la milito, en 1914, la anarkista movado dividiĝis en du tendencojn: unu subtenis la vidpunkton, ke la anarkistoj devas partopreni la militon por venki la "germanan militarismon"; tiuj tendencanoj argumentis, ke "Entente" konsistas ĉefe el demokrate regataj ŝtatoj kaj sekve, ke iliaj civitanoj havas intereson defendi siajn liberojn . . .

Al tiu tendenco apartenis sufiĉe famaj teoriistoj kiel Kropotkin, Grav, Ĉerkezof, Paŭlo Reklü (Reclus), Malato, Pijero (Pierrot), Kornelisen k. a. Por pravigi sian sintenon, ili eldonis manifeston, kiun subskribis 16 samopinianoj. Tiu dokumento fariĝis mondfama. Kiu sin okupas pri la historio de la laborista movado, tiu devas nepre scii almenaŭ pri ĝia ekzisto.

Al la alia tendenco, t. e. al tiu, kiu staris ĉe la vidpunkto, ke anarkistoj neniel devas defendi ian ajn ŝtaton, apartenis S. For (Faure), Malatesta, Luigi Fabri k. a. malpli konataj.

Oni povus kredi, ke la dum- kaj postmilitaj okazintaĵoj konvinkus la anojn de la unua tendenco pri ilia eraro. Tiel ne okazis. Kaj ankoraŭ nuntempe oni diskutas en la anarkistaj gazetoj pri tiu demando.

En la junia n-o de la franclingva revuo: "Plus Loin" (Pli malproksimen) troviĝas artikolo, subskribita de A. Bertrand, en kiu oni povas legi jenon:

"Al la anarkistoj pli urĝege ol al ĉiuj aliaj homoj, sin trudis la devo kontraŭstari al la atako de la germana militarismo . . ."

"Rilate al la franca militarismo, ni kontraŭbatalas ĝin kiel ĉiujn aliajn; sed, jam de 1870, ĝi neniam estis sufiĉe potenca por konsistigi danĝeron por la mondpaco. Se ŝanĝiĝus tia stato, mi dubas, ke la lando denove unueciĝus spontane, kiel en aŭgusto 1914, por kontraŭstari al la germana invadinto. Mia animo kaj konscienco de anarkisto, mia franca civitaneco diktis al mi la devon solidariĝi kun la invadita nacio."

Tion mi volis citi por montri, ke ne nur en socialistaj kaj komunistaj rondoj troviĝas patriotoj, sed ankaŭ inter la anarkistoj.

Mi petas al la K-doj, ke ili skribu esperante al la Redakcio[1]) de tiu revuo por konigi sian vidpunkton pri la demando. Estus bona okazo por pruvi al la Redaktoro, ke esperanto ankoraŭ vivas. Tiu anarkisto-patrioto, d-ro Pijero, cetere tre honesta kaj kompleza homo, parolis antaŭ nelonge pri nia lingvo kiel pri la malaperinta volapük . . .

E. L.



Infansklaveco en Persio

La persia gazetaro alarmbatas pro la terura ekspluatado de infanoj laborantaj en unu el la centroj de la tapiŝindustrio — en Kerman.

La persia tapiŝindustrio produktas precipe por la eksterlanda merkato. La eksporto de persaj tapiŝoj troviĝas ekskluzive en la manoj de eksterlandaj eksportistoj, en kies poŝojn fluas la ĉefa parto de la profito. Nur malgrandan parton ricevas la posedantoj de la tapiŝfarejoj, kaj ili siaflanke ĉiel ekspluatas siajn laboristojn.

En la tapiŝfarejoj laboras precipe infanoj kaj neplenkreskuloj. Malmultaj perlaboras 1 kranon 50 santimojn (25 kop.) tage. La meza laborpago egalas de 50 santimoj ĝis unu krano (9 ĝis 19 kop.). Somere oni laboras 11 horojn, vintre 9 horojn, seninterrompe. Eĉ la "tagmanĝon", t. e. peceton da seka pano, la laboristoj prenas, sidante sur la maldika trabeto, kiu per ŝnuroj de la plafono estas pendigita antaŭ la tapiŝo.

Pro la konstanta sidado la piedoj de la tapiŝfaristoj ne evoluas normale. Pro la laborado en aero plenigita per lanpolvo ili malsanas je ftizo. Precipe suferas la laboristinoj pro la dumviva sidado sur la trabetoj, ilia pelvo ne evoluas ĝuste, kaj ili perdas la eblon, normale naski infanon. Al 75% el la Kermanaj tapiŝfaristinoj ĉe nasko de infano devas esti farata operacio laŭ Kajzer, dum kiu 50% mortas. Ankoraŭ en Kerman estas kutimo ĉe la malriĉuloj, fordoni siajn 6—7 jarajn filinojn en la tapiŝfarejon, subskribante kontrakton por 4—5 jaroj. Pago 50 ĝis 60 tumanoj (100 rubloj). Trionon de tiu sumo ricevas la gepatroj ĉe la sklavin-vendo, kaj la reston post fino de la laboro.

El gazeto "Zvezda", Perm (2144).

[1]) Adreso: "Plus Loin", 2, rue des Haudriettes, Paris (3-e).

Al ĉiuj Soveti-anoj!

Monon por la Adm. de SAT, ne sendu al Leipzig, sed al nia bankkonto ĉe C. K. de SEU en Moskvo. Niaj bankoj ne akceptas sovetian monon. — *Adm.*

JAŜASUN

Skizo pri Meza Azio

Printempa viglo — disfluinta en la spaco.

La spaco limiĝas — antaŭe kun apenaŭ distingebla ĉielbluo de Altaja montĉeno (ŝtupo al Tegmento de l' Mondo-Pamir); — malantaŭe kun hela radiado de leviĝanta suno. Oraj radioj el flava malproksimo ŝprucis en la spacon per ora fasko da lumstrioj, kaj la spaco dronis en ili, perdis mezuron de la distanco.

La vojo kiel verda rubando ornamas la brunan nudecon de la kampoj. Altstaturaj kiel kandeloj kaj belformaj kiel cipresoj, poploj kaj larĝkronaj ulmoj formas seninterrompajn verdajn murojn laŭlonge de la vojo.

Horo de ĉies vekiĝo . . . La pensoj degelis en la oraj lumtorentoj kaj en la dolĉaj parfumoj de la printempo, distriĝis — simile al makuloj de la lumo penetrintaj sur la vojon tra foliaro, ŝanĝantaj ĉiam la lokon obeeme al tuŝo de venteto. Lule knaretas "araba"[1]). Polveroj forŝutitaj de la radoj dancas en luma fasko . . .

El malvigla rondirado de pensoj kaj sentaĵoj apartiĝas vidimpreso: — multkoloro. Estas "ĉapan" (multkolora vesto) de mia veturigisto. Li rajde kondukas la veturilon. La ĉevalaĉo sen troa diligento plenumas sian modestan devon. Tiuj etaj detaloj, kiuj ne intence antaŭfiksiĝis en la kapo, iel ordigas la mensan funkciadon.

Ĝurabaj[2]) kantas. Laŭ kutimo de sia popolo li memverkas. Per voĉo tro subtila por matura homo, nenature alttona kaj falsa, li improvizas:

"Ho, la suno ardas, ardas kiel oro . . .
Bona vojaĝanto donas al mi monon.
En "Kiŝlak" Najman-o ni la teon trinkos,
Poste iros pluen, ĝis vojaĝ' finiĝos."

La pensoj de la kantanto turniĝas ĉirkaŭ la plej proksimaj aferoj. Li vortigas momentajn impresojn. Nebuleca ĉielkoloro de la malproksima montaro donas al li novan impreson, turniĝas liaj pensoj en alian direkton:

"Estas mult' da neĝo sur Arslan-montaro;
Estos mult' da akvo en la nuna jaro.
Bona kamparan' kulturas zorge teron;
Riĉe li rikoltos, kiam temp', greneron."

Liaj pensoj direktigas miajn okulojn al la kampoj. Kiom malproksimen la okulo povas vidi — glataj ebenaĵoj, montetoj kaj valoj estas kovritaj per la punktoj de homfiguroj. Estas tempo por prepari la kampojn por semado de kotono kaj rizo. La rizkampoj jam estas plene subakvigitaj kaj tre similas al marĉoj. Eĉ la birdaro restanta ĉe la akvo, ĝustigas tiun ĉi similecon: estas cikonioj kaj anasoj. La kotonajn kampojn oni kovras per retaĵo de kanaletoj

[1]) Indiĝena veturilo. Sur akso de du grandegaj radoj (2 m.-diametro) estas fiksita sidloko el verga reto por vojaĝantoj kaj por ŝarĝo. Oni jungas ĝin per sola ĉevalo. Pro la grandaj radoj "araba" estas speciale adaptita por vojoj de Mez-Azio.

[2]) La veturigisto.

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas tekslaboristo, estas 54-jara kaj produktas nuntempe nigran ĉaprubandon silkan. La laboraĵo fabrikiĝas per granda maŝino, nomata muelseĝo. Tia maŝino havas longecon de 5 ĝis 6 metroj kaj estas 3 metrojn alta. Ĝia mekanismo estas tre multflanka kaj tial ankaŭ ĝia malfunkciigo. Ni laboras laŭ tarifo. La baza salajro estas 64 fenigoj po horo, la plej alta salajro estas 20 elcentojn pli alta ol 64 fenigoj. Ni devas labori multe, por ricevi je la salajra tago la ĝustan salajron. Por la metro ni ricevas iom pli ol 2 fenigojn. Ni laboras nuntempe 48 horojn semajne. Mi devas vivi tre ŝpareme, por ne fari ŝuldojn. Mia edzino ricevas semajne 13 markojn da mastrumada mono, por impostoj mi bezonas kun la socia asekuro 2,50 mk., krom tio ankoraŭ 1 mk. por sindikato kaj aliaj elspezoj (gazeto, fajrotombiga [kremacia] asekuro), kaj monate 15,15 mk. por lupago. Krome mi devas zorgi pri vestoj kaj aliaj elspezoj. Mia edzino nenion perlaboras. Mia metio estas unu el la plej malbone pagataj ĉi tie, kaj la metalmontaro (Erzgebirge) en la vivmaniero estas tre multekosta. Ni manĝas multe da margarino kaj malmulte da viando kaj trinkas multe da nigra kafo, malofte kun lakto. Mi ne plu havas malgrandajn infanojn. La du filoj estas 22- kaj 25-jaraj. Krom al nia esperanta movado mi dediĉas min al la liberpensula movado. Tiucele mi estas kunlaboranto ĉe la "Volksstimme" (popola voĉo), kiu aperas en metalmontaro. Ĝi estas socialista gazeto.



M. Kreusel (Annaberg, Germ.).

Kiel metilernanto en AEG

(Fino)

6. Emo kaj amo al la afero

Kial la lernantoj ne facile forgesas, malgraŭ tiom da kontentigemo, insultvortoj, batoj kaj spionaĵoj en la fabriklernejo, despli, ĉar ili ja rilatis al la afero per emo kaj amo? Certe ja, tiuj ĉi emo kaj amo unue ekzistis per la asertoj de nia diktaĵ-instruisto. Sed, eĉ se ni estus kunportintaj efektive tiujn ĉi ecojn, tiam la fabriklernejo ĉiam denove estigus kaŭzojn por ilin perdi. Ekz. tiam, kiam la plej granda parto el niaj ekzerclaboroj finiĝis en la rubujoj kaj nia animstato similis al tiu de tajlorlernanto diranta malbonhumore: "Majstro, mi finis la kudradon, ĉu mi povas ree distranĉi ĝin?" Ofte ni estus opiniintaj nin kapablaj fabriki praktike uzeblajn laboraĵojn anstataŭ senutilajn ekzercaĵojn, kiuj enuigis nin nemezureble. Per tio la firmo ja krome povus havigi al si profiton, ĉar ĝi povus ŝpari parton el la sumo de 2000 g.m., kiun la firmo, laŭ diro de unu el niaj instruistoj, perdas pro ĉiu lernanto.

7. La matenmanĝo en la ĝardeno — vero kaj fabelo

Lasttempe deruliĝis filmo montranta la AEG-metilernantojn en belega ĝardeno dum matenmanĝo. Mi povas konfirmi, ke ekzistas fakte bela ĝardeno en AEG. Mi ankaŭ povas konfirmi, ke oni bone povas manĝi en ĝi. Sed tiun ĉi feliĉon ni nur ĝuis kelkajn tagojn, ĉar tuj post mia eniro en AEG oni malpermesis al ni lernantoj, ne indikante motivon, surpaŝi la ĝardenon. De tiam ĝi estas ŝlosita paradizo, kiu malfermas siajn pordojn laŭŝajne nur por filmbildigo.

8. Libertempo por dekutimiĝo

Kaj la abunda libertempo, kiun ricevas la lernanto? Ankaŭ tiu ĉi favoraĵo ne estas konsiderinda. Ni nomis tiun ĉi libertempon "Libertempo por dekutimiĝo", ĉar oni ricevis en la unua lernjaro 12, en la dua 9, en la tria 6 kaj en la kvara 3 tagojn da libertempo.

9. Fino bona — ĉio bona!

Mi havis ankoraŭ specialan okazon ekkoni la prizorgemon de AEG dediĉatan al ĝiaj lernantoj. Antaŭ ne longe mi estis finlerninta. Kelkajn tagojn poste mi troviĝis sur la strato — estis maldungita. Eĉ ne 13 semajnojn la firmo, kiu perfektigis min dum 4 jaroj, trovis okupon por mi kiel finlerninta laboristo. Almenaŭ tiom longe la AEG estus povinta laborigi min, por ke mi poste povu pretendi plenan subtenon kiel senlaborulo de la koncerna institucio. Sed la sklaveca porfabrika pensmaniero, kiu estus kreita per tia agmaniero, ja nur estus doninta al AEG nematerian profiton. Emil Stolp.

Trad. el "ISK" n-ro 4 de aprilo 1928
SAT-rondo Landshut i. B.

---

por akvumo. — Perfekta sistemo! En la lando, kie preskaŭ ne ekzistas vintro kaj aŭtuno, kie tempon inter du pluvoj oni mezuras per monatoj, kie la varmo en someraj tagoj atingas pli ol 50° C., oni plantas kreskaĵojn, kiuj postulas plej multe da akvo. Ĉe supro de malproksima montaro somere degelas la neĝo. La akvo fluas malsupren kaj formas riverojn kaj torentojn, kiuj direktiĝas en la varmegan, sablecan valaron. La homo per reto de "arik"-oj[1]) diversdimensiaj kondukas ĝin al la kampoj kaj trinkigas ilin per viviga fluaĵo.

Akvo en Turkestano pli ĝuste ol ie estas nomata: sango de la tero. Kie estas la akvo, ni trovas riĉaĵon, kampojn kaj ĝardenojn; kie ĝi forestas, regas senviva dezerto, "moviĝanta sablo", "malsata stepo". La problemo de la akvumado estas la plej grava en Mez-Azio, kies solvo havas ne nur ekonomian, sed ankaŭ politikan signifon.

[1]) Kanaloj.

Turkestano liveras grandan parton de la krudaĵo bezonata por teksfabrikoj de Sovetio. Provizo da propralanda kotono ne estas sufiĉa por la postuloj de la industrio; tial la registaro aĉetas la krudaĵon ankaŭ eksterlande. Aliflanke ekzistas grandaj ebloj produkti propralandan krudaĵon en necesa kvanto, kondiĉe ke dislarĝiĝu la kotonkampoj kaj plialtiĝu ilia rikolto per apliko de pli bonaj metodoj de vilaĝa mastrumado. Utiligi el la dezerto difinitan terpecon, akvumi ĝin kaj fari plantebla por la kotono, estas la plej granda tasko de la mastrumado.

Trans milojn da kilometroj nord-orienta vento pelas parcelan sablopolvon el dezertoj de Suda Siberio kaj Norda Turkestano. Tiu ĉi polvo lokiĝas proksime de montoj. Tia multjarcenta procedo formis en Fergana valo mirige fruktodonan tavolon de la grundo — "lös". Kie estas "lös" kaj akvo, montriĝas mirakla kreskopovo. Por tiuj ĉi oazoj en senfinaj dezertoj de Meza Azio daŭre de la tuta historio de Turkestano la homoj mortige batalis kaj pereis.

Antaŭ pli ol dumil jaroj tiuj ĉi lokoj vidis la bronzvizaĝajn trupojn de Aleksandro la Granda (Makedona) kaj persan reĝon Kiro; la fama Timurlen lasis ĉi tie multajn signojn de sia agado kaj pereis ĉi tie; sovaĝaj, larĝvangostaj idoj de Mongolio, gviditaj de kruela Ĉingiz-ĥan dissemadis ĉi tie panikon kaj morton; giganta lavango de popoloj, dum historia epoko fama sub la nomo "granda transmigrado de la popoloj", iam piedpremis ĉi tiujn kampojn.

Tra jarcentoj regadis ĉi tie kruela "sovaĝa" hom-interbatiĝado, poste — "progresema", sed ne malpli kruela kolonia agado de cara Rusio. Ĉu la kialo de fruktodono en tiuj ĉi kampoj ne estas la sango malavare malsekiginta ilin? . . .

Ĝurabaj kantas:

"Estas tre laciga kampa la laboro,
Sed la fort' uzita kompensiĝos bone."

(Finota.)

TRA ESPERANTIO

INTER NI

Sablero enkroĉiĝis en la uretero[1]) de Kromŭel[2]), kaj jen pro tio la sorto de l' mondo aliiĝis. Per tia figuro la fama pensulo Paskal celis montri, ke malgrandaj kaŭzoj povas havi grandajn efikojn.

Esperanto estas per si mem io tute ne grava. Sed ni supozu, ke jam antaŭ 40 jaroj ĉiuj gvidantoj de laboristaj partioj, ĉiuj internaciistoj kaj pacifistoj lernus, propagandus kaj praktikadus tiun racie artefaritan lingvon. Tiaokaze, ĉu oni prave povus aserti, ke la historia procezo irus la saman vojon?

Kiu partoprenis SAT-kongreson, kiu dum jaroj interrilatis senpere kun K-doj el plej diversaj mondpartoj, kiu sentis sin forte ligita al movado, kie oni ignoras la landlimojn, kie oni parolas saman lingvon, tiu certe jam konvinkiĝis, ke estus tute ne ebla la patriotisma febro, kiu frenezigis en 1914 la spiritojn de milionoj da laboristoj-internaciistoj kaj kaŭzis tiom da mortigoj kaj ruinoj.

Nia sennacieca lingvo estas per si mem kvazaŭ sensignifa sablero. Tamen ĝi ankaŭ povus aliigi la sorton de l' homaro, se ĝi ŝoviĝus en la ĝustan lokon, t. e. en la cerbojn de la laboristoj. Esperanto estas nur ilo, kiun oni povas bon- aŭ malbonuzi. Sed ĝi tamen estas nepre necesa al la klaso, kies historia misio estas unuecigi kaj sekve pacigi la mondon.

Tion ni jam multfoje diris; sed ripetado tamen estas necesa. Tro da K-doj ja ne sufiĉe konscias pri la utileco kaj graveco de nia tasko. Tro da SAT-anoj eĉ konsideras sian esperantan laboron kiel akcesoron; tro da ili elspezas siajn monon kaj energion en bagatelaj servoj kaj sensignifaj taskoj . . .

Mi ne plu memoras, kiu famulo diris, ke "estas facile plenumi sian devon, sed ĝin koni estas malfacile . . ."

Nur tiu estas vera SAT-ano, kiu ekkonis, ke la esperanta afero indas, ke oni dediĉu al ĝi sian tutan liberan tempon, sian tutan energion, — sian tutan vivon . . .

E. L.

---

1) Nomo de la du kanaletoj, kiuj kondukas la urinon en la vezikon.

2) Kromŭel (angle Cromwell) mortis de rena ŝtonmalsano.

SAT-anoj ne pruntedonu vian Jarlibron al kiu ajn. Ĉiam postulu, ke servopetanto montru sian membro-karton. Gardu vin kontraŭ profitemuloj kaj parazitoj!

El Usono pri nia Eldon-Kooperativo

Laŭ SAT-statuto sub d) parto de "Celo" estas dirite: "Peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealon de nia Asocio". Kompreneble, ĉiu membro legis tion ne nur unu- sed multfoje, tamen laŭ siaj agoj, la plejmulto montris, ke ili aŭ ne komprenas ĝian gravecon aŭ ne indas la nomon de veraj SAT-anoj — nek eĉ esperantistoj.

Kiel plej ofte okazas, el lando de kie oni estus povintaj atendi plej grandan materian subtenon, oni ricevis tre malmulte. Tion mi estas devigata konfesi pri mia "dolarlando" Usono.

Kiam fondiĝis nia kooperativo, kaj la alvoko por monsubteno estis anoncita en "S-ulo", mi estis senlabora, senmona, kaj eĉ ŝuldis monon. Tamen, ricevinte laboron, antaŭ ol mi komencis repagi miajn ŝuldojn, mi dediĉis 20 $ (la plej grandan parton de semajna salajro) al tiu entrepreno. Mi ne atendis egalan fervoron de ĉiuj, tamen mi atendis multe pli, almenaŭ de kelkaj, kiuj povus, sen granda oferado, fari pli multe ol mi. Sed, avide trarigardinte la raportojn en "S-ulo", mi tuj senreviĝis, — eĉ ne unu usonan nomon mi trovis (krom mia). Post granda peno kaj konvinkado dum longa periodo, mi vendis niajn akciojn je valoro de eble 30 $ — la plej multaj estis po 1—2 $, unu 10 kaj unu 5 $-a. Neniu aĉetis el si mem.

Nun, en n-o 191 de "S-ulo", aperis sur la unua paĝo la alvoko "Fortigu nian Eldon-Kooperativon!" Ĉar mia traduko de "La Fera Kalkanumo" de Jack London estas anoncata en ĝi kaj mi ne emas ludi la ĉefrolulon, mi promesis al mi en la kunveno de "Esp. Laborularo" mencii nenion pri la afero, lasante tion al la aliaj. Kiel atendite, la K-doj, kvankam ili ĉiuj legis jam la gazeton, multe debatadis pri gravaj laŭ ili aferoj, sed ne menciis vorteton pri la admono de la SAT-Direkcio.

Fine de la kunveno mi ne plu povis elteni kaj demandis: "Gek-doj, ĉu vi legis la unuan parton de "S-ulo"? "Ho, jes," respondis du K-doj, "mi legis vian nomon." Jen ĉio! Mi estas kontenta — ili legis mian nomon. Mi diros nenion plu al ili. Sed leginte tion, ĉu vi usonanoj ne hontas sciante, ke ĉiuj SAT-eldonaĵoj estis ebligataj pro sindonemo de malpli bone salajrataj eŭropaj SAT-anoj?

G. Saville.

ATENTIGO

Lastatempe venis al la Redaktejo leteroj ne sufiĉe afrankitaj el kelkaj landoj, inter kiuj Sovetio kaj Svedio, por kiuj ni devus pagi punafrankon. Tiujn leterojn ni rifuzis akcepti. Sekve la sendintoj ne atendu de ni respondon al tiaj leteroj.

LA HISPANA SOCIALISTA PARTIO PRI ESPERANTO

En la lasta n-o ni jam komunikis mallonge, ke la 12-a Kongreso de la hispana socialista partio en Madrid akceptis proponon favoran al esp-o. Hodiaŭ ni publikigas la tekston de la voĉdonita k akceptita propono, kiu estis prezentata per speciala kongresa komisiono laŭ 3 proponoj de soc. grupoj en Cordoba, Pueblo Nuevo k Valencia.

La hispana soc. partio decidis: 1. Apogi fervore la propagandon de esp-o k klopodi, ke ĝi estu instruata ĉe ĉiaj laboristaj kulturcelaj institucioj; 2. Proponi la enkondukon k uzadon de esp-o en ĉiuj internaciaj centroj sociaj, politikaj k kulturaj; 3. Peti de la registaro la sisteman instruadon de esp-o; 4. Aliĝi al la 8-a universala laborista esp. kongreso, kiu okazos en Göteborg k sendi tien personan reprezentanton.

Kongresanoj, atentu!

Karavano al la 8-a Kongreso. — Ekveturo de Berlin la 12. aŭg. je 20.25-a h. (Stettiner Bahnhof). Alveno en Göteborg, lundon je la 21.35-a horo. — La veturbiletoj estas aĉetataj per la karavan-gvidanto la saman tagon de la forveturo. Ne sendu antaŭe monon. — La veturkostoj, inkluzive 25% da fervojrabato por la sveda linio, estas proks. 35 mk. g. — Germ. K-doj ne bezonas vizon, sufiĉas valida pasporto. — Renkontiĝo: Dimanĉon, la 12. aŭg., ĝis la 11-a horo, en atendejo de l' stacidomo "Friedrichstrasse Berlin". K-doj kiuj alvenos post la 11-a horo sendu la monon (35 mk. g.) antaŭe al K-do Muravkin.

Ĉiuj K-doj, kiuj intencas partopreni ĉi tiun karavanon, tuj anoncu sin ĉe: K-do Herbert Muravkin, Wielandstr. 11, Berlin-Charlottenburg 4, tel. Bismarck 9717.

SAT-KONFERENCO

18./19. aŭgusto 1928, Göteborg

3-a komuniko

Aliĝintoj. 4. Arbetarnas Bildnings Förbund (Lab. Kleriga Asocio Tutsveda); Reprez. Ernst Eriksson (Stokholmo), Ernst Jungen (Göteborg).

Rajtigitaj delegitoj anoncu sin tuj. Asocioj sen delegoto sendu raporton. Se iu K-do speciale preparis paroladon pri iu fako (vidu liston en n-o 181), li informu la Kongreskom. en Göteborg, kie ni finaranĝos la tagordon. Lastmomentaj aliĝontoj ankaŭ skribu senpere al Göteborg.

Raportaro de la Ekzekutiva Komitato de SAT

Ekzekutiva Komitato de SAT antaŭmetas al la SAT-anaro resuman raportaron pri la interkongresa jaro. Plena raportaro estos farata ĉe la Kongreso.

Ekzekutiva Komitato. Post la Lyon-a Kongreso la Sennacieca Konsilantaro reelektis la ĝisnunajn anojn de E. K., nome K-dojn Cachon, Glodeau, Lanti, B. en Parizo kaj K-dojn Lerchner-Leipzig, Nekrasov-Moskvo. Eksiĝis K-do Roux depost la antaŭa jaro, ĉar li ne plu loĝas en Parizo. La S. K. elektis, por anstataŭigi lin kaj la laŭstatute mankantan membron, K-dojn Barthelmess kaj Dessoit, ambaŭ en Parizo. La Parizaj membroj (kiuj formas la Direkcion) kunvenis ĉiumonate 2-foje, kaj pli ofte, kiam necesis. La Sekretario de E. K. estas K-do Glodeau, Prezidanto: K-do Lanti, Protokolanto: K-do Cachon. La decidoj ĉiam okazis unuanime, kaj la protokolaro atestas pri la amasego da laboro plenumita.

Rilatoj inter Sennacieca Konsilantaro kaj Ekzekutiva Komitato. La rilatoj ĉiam estis glataj. Ĉiujn gravajn problemojn la E. K. metis antaŭ la S. K.-anoj. Ne ĉiuj S. K.-anoj bedaŭrinde respondas akurate al la cirkuleroj de la E. K. Ni tamen supozas, ke la silento de la nerespondemuloj signifas aprobon de nia agado.

Rilatoj inter SAT kaj LEA-oj. La Lyon-a Kongreso komisiis al ni klopodi dum la venonta jaro por reguligi la interrilatojn inter SAT kaj la diversteritoriaj LEA-oj. Tiucele estis ellaborata de E. K. proponaro, kies teksto estis sendata al ĉiuj LEA-oj, t. e. 11 organizoj. El ili respondis 9 (la britia, hungaria, svedia, francia, germania, nederlanda, latvia, polia, kaj aŭstria); nerespondis 2 (la norvegia kaj sovetia). La germania LEA verkis kontraŭ-projekton, kiu trovis la aprobon de la francia LEA. Ambaŭ tekstoj (de E. K. de SAT kaj de LEA germania kun la ŝanĝproponoj de la francia FEO) aperis en Sennaciulo (n-o 187).

Rilatoj inter SAT kaj la t. n. neŭtrala movado. Niaj interrilatoj kun burĝaj esp. institucioj limiĝis kiel ĝis nun je teknikaj aferoj. Precipe la plano de Plena Vortaro, kiun nia Asocio entreprenis efektivigi (pri ĝi ni parolos pli detale en alia loko [venonta n-o]), necesigis rilatojn kun la aŭtoritataj lingvaj institucioj en Esperantio.

Redaktora demando. Ankaŭ dum la lasta jaro la redaktora demando kaŭzis al la E. K. kelkajn ĉagrenojn kaj malagrablaĵojn. La 17. julio 1927 s-ro Krestanoff enoficiĝis kun monata salajro de 800 ffr. plus loĝado. Krome li ricevis pagon de duono de siaj vojaĝkostoj Plovdiv—Parizo, nome 600 ffr. Krestanoff ne plenumis siajn taskojn kaj ĉe la riproĉoj de K-do Lanti finfine li simple forlasis sian postenon, tiel ke la 5. novembro 1927 ni ree estis sen redaktoro. Pro tio ni ricevis riproĉojn de kelkaj K-doj, kiuj opiniis, ke ni facilanime dungis Kr. Fakte ni nur post longa korespondado, el kiu ni povis logike konkludi, ke Kr. konvertiĝis al niaj ideoj kaj sincere estus preta sin dediĉi tute al nia movado, dungis lin kiel redaktoron. Kr. havis nur teknikan respondecon, li ne okupis gvidan postenon en SAT kaj neniam ĉeestis kunsidon de E. K. Post la foriĝo de Kr. unu aŭ du numeroj de "S-ulo" devis tute esti redaktataj de K-do Lanti kun helpo de K-dino Limouzin. Se oni konsideras, ke K-do Lanti devas perlabori siajn vivrimedojn, ke li devas plenumi multajn taskojn pri la gvidado de SAT, oni vidas la neeblecon, ke li povu daŭre redakti la gazeton. Pro tio ni devis provizore pagi (komencante de n-o 165 en novembro) al K-do Grenkamp 140 ffr. por ĉiu numero, kies materialon li prilaboris. La 1. februaro 1928 enoficiĝis K-do Barthelmess kun monata salajro de 900 ffr. plus loĝado, kiu tenas ĝis hodiaŭ la oficon kaj kontentige laboras. (Pri la gvidado de "S-ulo" vidu specialan raporton [venonta n-o]).

Administracia Komisiono. La novelektoj de la Administracia Komisiono okazis la 2. majo 1928 ĉe la Leipziga SAT-anaro. La Komisiono konsistas el: K-doj Richter, prezidanto, Riese, anstataŭanto, Hofmann, protokolanto, Emisch, anstataŭanto, Schröter, Bauer, reviziantoj. Krome K-do Enghardt, fakulo, akceptis helpi al la reviziantoj en ilia laboro de kontrolado.

Kontrol-Komitato. Ĝi fakte neniam regule funkciis. Cetere jam delonge mankas unu membro. La nunaj estas: K-doj de Bruin en Lonneker (Holando) kaj Keller en Breslau (Germanio). K-do de Bruin mem proponas ŝanĝon en tiu organo; li deziras, ke la kontroltasko estu lasata al la Ekz. Komitato. Tiu solvo ne plaĉas al ni, ĉar ni ja havas tro da laboro. Tamen ni konsentas, ke profunda ŝanĝo estas nepre necesa. Ĉu ne utilus, ke la membroj de la K. K. loĝu en la sama urbo? Pri tio decidu la Kongreso.

Literaturon riĉan bezonas SAT.!

Vi helpos trafe al ĝia kreado, aĉetante la **AKCIOJN** de la **ELDON-KOOPERATIVO!** — Prezoj: Serio A = 1 dolaro, Serio B = 1/2 dol.



Turnu vin al la Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

Jarlibro. Pro la demandiloj, kiujn ni sendis dum la lasta jaro al ĉiuj membroj, sed ankaŭ pro la plimultiĝo de la membraro ĝenerale, la adresaro en tiu ĉi jaro estas multe pli ampleksa. Ĝi havas 448 paĝojn. Ne malatentu, ke ĝis nun neniam nia Jarlibro havis tioman amplekson. Sed la utileco de la signaro responde al la demandiloj estas sendube. La interrilatiĝo de la membraro estos pli kaj pli intima. Grandan prokraston bedaŭrinde suferis la aperigo de la Jarlibro pro jenaj motivoj: 1. ĉar ni presigis ĝin en malgranda presejo en Parizo, kiu nur havas mankompostadon; 2. ĉar ĝi ampleksas, kiel dirite, 448 paĝojn; kaj 3. ĉar la multaj signoklarigoj en la adresaro tre komplikigis la kompostlaboron. Sed kompense ni havas tre grandan kostoprofiton, kiu estas konsiderinda. Ne presigante la Jarlibron en Leipzig, ni gajnis pli ol 10000 frk. (ĉ. 2000 gmk.).

Literatura Komisiono. (Eldon-Kooperativo). Ampleksa artikolo aperis sur la unua paĝo de "S-ulo" n-o 191. Ni tial ne ripetas en ĉi tiu resumo la titolojn de la kontrolitaj, kontrolataj, preparataj, presitaj kaj eldonotaj verkoj. Dum la jaro 1927/28 el la Komisiono eksiĝis K-do J. Zilberfarb (Ĥarkov). Kunlaboris en la kontrolado krom la Odesaj K-doj (sekretariaro) ankoraŭ kelkaj K-doj (el Berlin, Kremenĉug, Ĥarkov).

Programo de SAT. La Sekretario de la Komisiono elektita dum la Lyon-a Kongreso por verki projekton de programo submetitan al la Kongreso havigis al ni tekston, kiu ŝajnas al ni neakceptinda. Unue, tial ke la anarkista tendenco ne estis reprezentata en la Komisiono (en Lyon, laŭ propono de iu K-do, oni elektis K-don Richter-Cassel, kiu ne ĉeestis la Kongreson kaj kiu ne konsentis partopreni la laborojn de la Komisiono). 2. Tial ke la Komisiono ne povis atingi unuaniman interkonsenton pri la teksto. 3. Tial ke la starigo de programo ŝajnas al ni iom antaŭtempa. 4. Tial ke la teksto proponita entenas kontraŭdirojn kaj kelkajn punktojn, kiujn ne ĉiuj reprezentantoj de la diversaj laboristaj tendencoj povus akcepti kaj ĉefe tial ke en siaj ĝeneralaj trajtoj ĝi tro similas programon de politika partio. Se la Kongreso decidos, ke jam nun SAT devas havi programon, tiam ni prezentos alian projekton kaj petos elekti ĉu la nian, ĉu tiun de la Programkomisiono. Almenaŭ ni ne volas akcepti respondecon en la alpreno de la teksto proponita de K-do Muravkin je la nomo de la Programkomisiono.

SAT-konferenco en Göteborg. Ni ĉiam celis eviti, ke SAT fariĝu burokrata, centraligita organo. Kiam K-do faris al ni interesan proponon kaj estis preta preni sur sin la plenumon de la taskoj, ni kun ĝojo konsentis kaj donis la moralan helpon, kiun ĉiu tia iniciatinto rajtas ricevi de la Gvidantaro. Tial ni estis kontentaj lasi al K-do M. Starr la organizadon de la unua t. n. SAT-konferenco.

SAT kaj frataj organizoj. SAT sendis reprezentantojn al la Kongresoj de germania LEA en Nürnberg (aprilo 1928) kaj de francia FEO en Bourges (aprilo 1928). K-do Lanti ĉeestis la kongreson de Sindikata Amsterdama Internacio en Parizo (aŭg. 1927) kaj havis nur okazon, paroli kun K-do Sassenbach. Salutleterojn ni sendis al: Liberpensula Kongreso en Lodz (aprilo 1928), Kongreso de Eduk-Intern. en Leipzig (aprilo 1928), Norvega LEA-kongreso (nov. 1927), Liberpensula Kongreso en Belgio (aprilo 1928), Intern. Minista Kongreso en Nîmes (27. majo 1928). Nia administranto, K-do Lerchner, ĉeestis invitite de SEU la 10-jaran Jubileon de Sovetio en okt./nov. 1927.

Niaj Servoj. Pri la "Esperanto-Servo" de SAT por la gazetaro, gvidata de K-do Bässler (Leipzig), tiu ĉi K-do aperigis regule por ĉiu kvaronjaro raporton kun detaloj en "S-ulo". Ankaŭ aperis raporto pri la tuta agado de la jaro 1927 (en n-o 188).

Por ebligi la reeniron de "S-ulo" en Bulgarion post la registara malpermeso, la Direkcio turnis sin al la ambasadorejo de Bulgario en Parizo (per K-do Lanti persone). Sed ŝajne niaj klopodoj ne rezultigos ian sukceson en la afero. La SAT-organoj kaj SAT-aliĝo estas nun malpermesitaj en Italio, Hungario, Litovio, Rumanio, Bulgario, kie ni povus havi multajn membrojn kaj abonantojn. Tia stato kompreneble tre ĝenas nian antaŭeniradon kaj rezultas grandparte el la faro de kontraŭuloj de SAT, kiuj mensoge disfamaĉas, ke nia Asocio estas maskita komunista entrepreno — kaj ankaŭ de fervoraj kaj entuziasmaj SAT-anoj, kiuj ne ĉiam trafe kaj sufiĉe pripensite agadas!

Administraj aferoj. Kiel ni jam konigis per "S-ulo", la V-a Kongreso de SAT en Vieno havis profiton de kelkcent ŝilingoj, kiu estis dividata je 1/3 al la loka organizo en Vieno, je 1/3 al SAT kaj 1/3 al laboristaj helporganizoj de Vieno. Pri la VI-a Kongreso en Leningrado ankoraŭ hodiaŭ ni ne posedas la bilancon. K-do Dunajev-Leningrado fine likvidis sian ŝuldon al SAT. La VII-a Kongreso en Lyon akurate faris sian likvidan kasraporton, el kiu SAT havas profiton de 162 fr. frk.

(Sekvo en la venonta n-o.)

Maks Helc[1]) pri Esperanto

En n-o 7, julio 1928, de "Arbeiter-Esperantist" (Laborista Esperantisto) troviĝas reprodukto de originala letero, kiun ricevis la sekretario de LEA por la germanlingvaj regionoj. Jen ĝia traduko:

Pundomo Sonnenburg, la 24. aprilo 1928.

Kara K-do A. Birke, mi ricevis la du librojn kaj gazetojn ktp. pri esperanto. Multan dankon! Eble interesos vin ekscii, ke mi estas pasia kaj entuziasma pledanto por esperanto, kvankam mi mem bedaŭrinde ankoraŭ ne scias ĝin. Iam estonte tiu ĉi mondlingvo kunligos la homaron, ĉar sen ĝi vera interfratiĝo de l' homoj tute ne estas imagebla. Esperanto devas esti instruata devige en ĉiu lernejo, nur tiam estus metata unu el la plej firmaj fundamentaj ŝtonoj por reala kaj daŭra mondpaciĝo. La interrasa malamo estas plantata en la infanon jam kun la unua sono de la gepatra lingvo. Forigu la gepatran lingvon aŭ kompletigu ĝin per esperanto — kaj la tuta homaro havos unu solan patrion. Plej kore via M. H e l c.

GRAVA SUKCESO EN ĈINIO

La ĉina ministro por popol-instruado Ĉaj Dzuan Pej (rektoro de la Pekina Universitato) sciigas en la gazeto "Min-koĵe-po" (nacia gazeto) Ŝanĥajo (aprilo), ke la nacia registaro en Nanking decidis krei esp.-instituton en Ŝanĥajo. Jam estas elektita fonda komitato k la necesa mono. La celo estas krei kadron de esp. specialistoj por kultura interligo de Ĉinio kun la cetera mondo. — La akademio aranĝas konstantan 3-jaran kurson ĉe la universitato por 120 studentoj. Lecionoj k ekzercoj okazos ĉiutage 4 ĝis 6 horojn. La programo enhavas skribadon, legadon, verkadon en esp., historion de esp., instrumetodojn, tradukon de ĉinaj sciencaj verkoj esp-en k trad. de alilandaj esp. verkoj en ĉinan lingvon. Post finstudo la ekzamenitoj estos dissendataj al div. lokoj de Ĉinio por praktika laboro, instruado, interligo kun eksterl. ktp.

Laŭ raporto de K-do Jackson-Fu (2921).

Kolektiva sendado de niaj gazetoj

Jen farita eksperimento. En franca urbo mi ricevis kolektive, de novembro 1927 ĝis junio 1928, meze 10 "S-ulo"-jn, pretajn por transsendo, en la sama pakaĵo. Mi nur bezonis surglui francajn poŝtmarkojn sur la naŭ ne miaj "S-uloj", k transendi ilin al la naŭ K-doj, kiuj ricevis ilin la saman tagon aŭ la morgaŭan. — En pli eta urbo, tre facile oni redonus la gazeton al ĉiu, "el mano al mano", eble dum kunveno. Nenia laboro.

Tiel farinte, SAT ŝparis 12 mk. dum 7 monatoj, t. e. 20.60 mk. jare, aŭ 123.60 fr., por 10 "S-uloj" (proksimume, ĉar komence estis malpli, fine pli ol 10 abonantoj en la urbo).

123.60 fr. por dek, 12.33 fr. por unu abono, tio estas iom pli ol la triono de la abonprezo: 35 francaj frankoj.

Per kolektiva transsendo multokaze ni povas ŝpari por SAT la trionon aŭ la kvaronon de la abonpagoj.

Ĉu tio organiziĝis jam sufiĉe grandskale?

R a p o r t e t a n t o.

---

[1]) Maks Helc (germane = Max Hoelz), liberec-batalanto el la revolucia periodo en Germanio (1919—21), konata per siaj heroaĵoj kaj gvidkapablo en la ribeloj, kondamnita de la burĝa tribunalo je dumviva punlaboro. (Detalojn legu en n-o 164 "S-ulo").

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

GERMANIO. Berlin. 17. 6. okazis en stadiono Grunewald la ĉiujara lab. sportfestego. La lab. esp. grupo aranĝis kun la SAT-anaro grandan ekspozicion vizititan de proks. 2000 p. La ekspoz. havis fakojn: gazetaro, intern. literat., intern. koresp., fotoj, esp. en la praktiko, AIZ, gazetservoj ktp. Ĉeestis 50 esp-istoj kun du standardoj. Kelkaj lernolibroj k pk. estis vendataj. 25 K-doj anoncis sin por aŭtuna kurso. La asocio naturamika petis instruanton por kurso. 11. 4. parolis K-do Crouch el Nov-Jorko en B. dum SAT-kunveno pri Usono (lab. k esp. movado). — **JUGOSLAVIO. Kraljevo.** Post kelkmonata apatio la intereso pri esp-o pligrandiĝis inter la laboristaro. Ni estas nun 10 grupanoj. Kunvenoj ĉiudimanĉe en la sindikatejo. Plej multe malhelpas nian laboron la granda senlaboreco, pro kiu la kursanoj ne longe restas en la urbo. (10 164.) — **Bos. Brod.** La lab. esp. klubo "Stelo" aranĝis de 29. 6. ĝis 1. 7. sian unuan ekspozicion en popollernejo. Estis montrataj pli ol 150 div. esp. gazetoj. Vizitis ĝin 300 p. Oni rezulte povos malfermi novan kurson. (10 568).



Kongresmarko farita laŭ desegnaĵo de K-do Gunnar Torstensson.

Havebla ĉe la Kongres-Komitato

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

D a i l y H e r a l d, London, 22. 6.; E l S o c i a l i s t a, Madrid, 19. 6.; S e m a j n a r a p o r t o d e V O K S, Moskvo, n-oj 22/23 (resumo en esp., Gorki k esp.); S o c i a l i s t e n, Kopenhago (majo/jun.); D e r D e u t s c h e E i s e n b a h n e r, Berlin, 17. 6. (kurso); K l a s s e n k a m p f (Klasbatalo), Halle, 13. 6. (regulan semajnan kurson laŭ "Petro"); H a n d e l - u n d G e w e r b e t r e i b e n d e (negocanto), Wien, 9. 6. (malvafore!). L a b o u r W o m a n (Laboristino), London, julio; T h e M i n e r (La Ministo), London, 23. 6.

Pri la SAT-kongreso raportis:

K l a s s e n k a m p f, Halle, 13. 6.; T r a v a i l (Laboro), Lyon, 23. 6.; T h e C l a r i o n, London, junio.

Someraj monatoj!

Oni ekskursas! Oni kantas!

La

Proletaria Kantaro

estos utilega al vi!

Ne diru, ke ĝi kostas tro multe: Centoble rekompencata estos la mono elspezata por tiu libro!

Prezo: 2,50 mk. g.

Mendu ĉe Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Komerca Vortaro en Esperanto. De Rob. K r e u z, L. K., k Aless. M a z z o l i n i, L. K. Eld. Esp. Eldonejo A. Paolet, S. Vito al Tagliamento (Italio). 96 pĝ. Formato: 11½×17 cm. Tole bindita. Prezo: 12 ital. liroj. — Ni kredas, ke tiu vortareto kaŭzis multan detal-laboron k ke la tasko ne estis facila, kiel s-ro Kreuz diras en sia antaŭparolo. Ni konstatu, ke tiu vortaro povas doni tre bonajn servojn al fakulo. La aŭtoroj ne facilanime pritraktis sian aferon, sed apogis sin sur la konsiloj k rekomendoj de akademianoj k L. K.-anoj. Sekve la verketo havas efektive pozitivan valoron. Ni rimarkas grandan singardemon rilate al enkonduko de novaj vortoj. La difinoj ĝenerale estas sufiĉe klaraj k precizaj. Sed tute malsufiĉa estas la difino pri "kapitalo". La aŭtoroj nur donas klarigon pri unu (cetere plej malsignifa) eco de "kapitalo".

Resume, kiel fakvortaro la verketo estas valora pliriĉigo de la esp. vortara literaturo.

N. B.

Brno. Ekspozicio de l' samtempa kulturo en Ĉeĥoslovakio. 26. 5.—30. 9. 1928. Ilustrita propagandfolio por la vizito de la urbo Brno (Brünn) k ĝia ĉirkaŭaĵo. Plano de la ekspozicio. Adreso nemontrita.

La sango-ruĝa Vieno. 70 bildoj pri la 15. k 16. julio (1927). Germanlingva broŝuro kun originalaj fotoj el la sangaj tagoj de la pasinta julio en Vieno, kun plena esp. traduko de la teksto. La E. K. de aŭstriaj komunistesp-istoj prizorgis la tradukon de tiu interesa dokumento, celante utiligi la entenatan materialon por gazetoj, murgazetoj, kunvenoj ktp. La unua eldono de tiu broŝuro estis konfiskata, k la dua nur povis aperi cenzurite; sed la esp. traduko estas farita laŭ la unua (originala) eldono kun speciala signo de tiuj tekstoj k bildoj, kiuj estis konfiskataj. La prezo de la broŝuro egalas al prezo por 2 ekz. de "S. R." (Por kom. gazetservantoj senpaga). Financan subtenon, por daŭrigi la intensan laboron, ni volonte akceptos. Ĉion sendu al K-do O. Bässler, Gerberstr. 24, H. II, L e i p z i g C 1 (Germ.).

Esperanta manĝokarto en sveda restoracio "Pagod" en Stokholmo. La ĉefservistino partoprenas en kurso de s-o Ĉe.

Du kantetoj. Kvarpaĝa kantfolio kun tekstoj de "La Espero" k "Tagiĝo". Eld. Eldona Soc. Esperanto, Fako 698, Stockholm 1. Prezo: 10 ekz. 1 sv. fr., 100 ekz. 8 sv. fr. afrankite.

Petr Dânoy, La Granda Leĝo. N-o 2 de Biblioteko Nova Kulturo, Burgas (Bulgario). Trad. de Dian. 24 pĝ. Form. 12×19½ cm. Prezo 0,40 sv. fr. — Kiel la unua volumeto tiu ĉi n-o pritraktas la moralinstruon de mistika sekto "Blanka Frataro".

Kommunistische Partei der West-Ukraine (KPZU), Die Ukrainische Nationale Frage (Materialoj al la demando de l' t. n. ukrainiaj naciaj deflankiĝoj ("Ŝumskismo") en la Komunista Partio de Ukrainio kaj la Kom. Partio de Okcident-Ukrainio). Lemberg, en la propra eldonejo de la C. K. de KPZU. 1928. 64 paĝoj. En germana lingvo.

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉ i a m citu vian membro-numeron.

NIA POSTO

10 435. — Vi estas tro modesta, taksante vian kapablon. Sed vere viaj versoj montras ankoraŭ multajn mankojn. Se ni presigus ion post prilaboro, mi preferus la lastan 1. ĉar ĝi estas originala, 2. ĉar ĝi estas klasbatala. La lingvo de la 3 tradukoj estas riĉa k bela, sed la formo bedaŭrinde ne tre perfekta, en la finrimoj vi tro ofte malsukcesas (oni ne rimas "fundo — fundo", oni laŭeble evitas "egoj — egoj", "aĉe — aĉa"). Ĉar via emo por poezio evidente estas tre profunda, mi ne malkonsilas al vi verki k pliperfektigi vin. Provu verki originale en bona okazo! N. B.

9082. — Via artikolo estas preskaŭ kopio de artikolo samtema aperinta en n-o 189! Sekve ni ne povas uzi tiun ripetaĵon.

3980. — Via "Tago" aperos siavice.

7471. — Via "Vivo" aperos siavice.

11 757. — Ni kredas kompreni el via karto, ke vi deziras scii la adreson de K-do 10 085. Ni ĝin ne havas. Atendu la aperon de l' Jarlibro dume, en kiu vi trovos ĝin (Isle of Man). Ni konsilas al vi, ellerni la lingvon!

Red.

2105. — Ĉu ekzistas faka vortaro pri radio? Laŭ mia scio tiu vortaro ne ekzistas.

8358. — Jes, mono estas ricevita. Adm.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO.

K-do Fr. Mittermayr, Wiener Reichsstr. 2-a, Linz, dez. koresp. k interŝ. PM kĉl.

K-do Franzisko Belic, Altkettenhof, 3, Schwechat ap. Wien, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PM, bfl. Certe resp.

K-do Maxim Bilek, Althausstr. 5, Amstetten, dez. koresp. kĉl., L, PI, bfl, krom Germanio. Certe resp.

— Esp-isto (22 j., fajrobrigadisto), serĉas junan K-don(inon) en USSR, kiu volas koresp. kun li por reciproka perfektigo en esp. Adr.: Fr. Mrazek, Ettenreichgasse, 20/17, Wien-X.

BRITIO.

K-do George C. Roche, 75, Balls Pond Road, Dalston, London, N 1, dez. interŝ. PI kĉl.

ĈEĤOSLOVAKIO.

K-do Richard Havelka, Unter-Maxdorf ap. Gablonz a. N., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp.

— PM-valorojn mi interŝanĝ. kun la tuta mondo. Mi posedas multajn PM por elekto. Resp. garantiata. Adr.: Friedrich Dutz, Fabrikstr. 23, Elbogen.

GERMANIO.

Adresŝanĝo: K-do Kurt Straube, Wolfsgrund, Unterkirnach i. Baden (antaŭe Oberfrohna) 9301.

K-do Phil. Jahn, Hof-Moschendorf in Bayern, dez. koresp. kĉl., interŝ. L, PK, belajn bildojn, vidaĵkartojn k. a.

K-dino B. Reger, Hohensteiner Str. 63/2, Limbach i. Sa., dez. seriozan koresp-adon pri ĉ. temoj kĉl.

— Juna sportulo (atleto), dez. koresp. kun ĉ. K-doj, kiuj intencas renkontiĝi dum la Viena Olimpiado. Resp. garantiata. Adr.: Karl Braun, Kühruh, 17, Schweinfurt in Bayern.

K-do Bernhard Lehmann, Kolonio Friedrichshöhe, Caputh, dez. koresp. kĉl. L, PI, precipe kun Hispanio, Japanio k Ĉinio. Resp. garantiata.

K-do Fritz Pohl, Nr. 40-D, Neukirchen im Erzgebirge, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Certe resp.

— 8-a SAT-kongresanoj danaj koresp. kun junulo Herbert Hauenstein, n-o 115-B, Neukirchen i. Erzgeb. — Krome mi koresp. kĉl. L, PI, bfl.

K-do Kurt Anger, Albertstr., Wilkau in Sachsen, dez. koresp. kĉl., L, PK, PI.

K-do Arthur Strobel, Bachstr. 202, Wilkau i. Sa., dez. koresp. kĉl., L, PK, PI.

K-do Felix Kahle, Schneeberger Str. 105, Bockwa ap. Zwickau i. Sa., dez. koresp. kĉl. L, PK, PI.

Adresŝanĝo: Lois Ensmann, Heimvolkshochschule, Salomonstr. 21, Leipzig C 1 (antaŭe en Mühldorf, Oberbayern).

K-do Gerh. Faber, Franziskanerstr. 23, Dortmund, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. certe.

— Nia grupo aranĝas letervesperon la 27. julio. Sendu L, PK, PI. Resp. garantiata. Adr.: Paul Majewski, Waldenburger Str. 43, Niedersalzbrunn i. Schl.

HUNGARIO.

K-do J. Ruzsits, Zslonay 5, str. 87, Pécs, dez. interŝ. L, PI, esp-aĵojn kun ekstereŭropaj landoj.

K-do Karlo Beimel, Pucherstr. 21, Pécs, dez. koresp. L, PK, PI, pri div. temoj kĉl., ĉiam resp.

K-dino A. Pétermann, Pécsbányatelepi-str. 37, Pécs, dez. koresp. kĉl. L, PI, nepre resp.

K-do Johano Szabo, Pucherstr. 24, Pécs, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PI.

KANADO.

— La Montreal-a esp. grupo dez. koresp. kĉl. Adr.: Francisko Reingruber, stacion N. Box, F., Montreal.

LATVIO.

K-do Edgaro Bellin, Kurmanova iela, 11 ĝis 17, Riga, dez. interŝ. PM kĉl., precipe kun Sovetio, Estonio k Litovio.

NORVEGIO.

— Pro grandamasa alveno de koresp-aĵoj mi petas miajn koresp-antojn pacienciĝi. Certe ĉ. ricevos resp. — A. Stensrud, Torshovgt. 4, Oslo.

SOVETIO.

K-do A. Nikitin, Timaŝevo, Samar. gub., dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo, labmovado, virina vivo k pri ĉ. temoj. Endetale pri balotoj en germ. parlamento. L, PK, ĉiuj ricevos resp.

— La ĉelo de IRH en lernejo 5 de Sebastopol dez. koresp. kun lernantoj el germ. lernejoj. Adr.: Sepastopol, ŝkola, 5, Jaĉejke MOPR.

K-do V. Batalin (instruisto), ul. Adlera, 31, Medyn, Kaluga gub. dez. koresp. kĉl., precipe kun filatelistoj k junaj Gek-doj. Resp. garantiata.

K-do N. Mal (gvidanto de lab. dram-rondetoj), ul. Engels, 4, kv. 1, Moskvo, dez. koresp. kĉl.

K-do Leopold Zak, Moskvo estas devigata pro div. kaŭzoj provizore ĉesi la koresp-adon. Li dankas al ĉiuj siaj koresp-antoj.

— Junkomunisto dez. koresp. kun lab. gejunularo. Adr.: Moskvo-66, ul. K. Marksa Baumanovskij Rajom Komitet "Agitpropkobinet".

K-do A. Muĥin (ruĝarmeana-estro), Niĵegorodskaja ul. 5, kv. 2, N.-Novgorod, dez. koresp. kun eksterl. Gek-doj, precipe kun K-dinoj. Resp. garantiata.

— Okrkom MOPR, Krasnaja, 17, Krasnodar, dez. koresp. kĉl. organizoj de IRH k kom. organizoj pri klasbatalo. Resp. gar.

— **Ruĝaj eksterlandaj asocioj!** Ruĝarmeanoj de N-a regimento petas ruĝfratajn asociojn de la tuta mondo sendi salutleterojn al 10-jara ekzistado de nia regimento. La tago estas la 22. 7., tamen oni povas sendi ĝis 5. 8. Adr.: Al kursanto M. Golovkin, ul. 1-a Majo, Peski, 33, Sormovo ap. N.-Novgorod.

K-do Kondjuĥov, Konnyi projezd, 1, kv. 46, Jalta, dez. koresp. kĉl., L. PK, PI, gaz.

— Gelernantoj de esp. rondeto, dez. koresp. kun junularo, laboristaro, virinaro, teksistoj, metalistoj, medicinistoj, abelujistoj ktp. pri ĉ. temoj kĉl. Adr.: I. I. Gurikov, Seleckaja, 385, v. Serpuĥov, Mosk. gub.

K-do A. V. Zimin (helpanto de librotenisto en konsumkooperativo 34 j.), dez. koresp. kun samprofesianoj. Adr.: poŝtkesto, 16, Koĥma, Iv.-Voznesensk. gub.

K-dino Nina Melnikova, Miŝjakovka, Zavodskij, 360, kv. 22, Sormovo ap. N.-Novgorod, dez. koresp. kĉl.

K-do Nikolao Titov, ul. Ja. M. Sverdlova, 26, komn, 7, Nijni-Novgorod, dez. interŝ. PM, PI kĉl.

K-do Geo Teterin, ul. Kr. Zorj, 19, kv. 16, Leningrad, dez. koresp. kun kom. kaj social. gejunuloj.

Atentu, poliaj esperantistoj!

Ĉiaj esperantaĵoj (ankaŭ SAT-eldonaĵoj) estas haveblaj je katalogprezoj ĉe librejo: "Ksiazka" Zielona 11, Lodz (Polio).

La multkoloraj, ilustritaj poŝtkartoj de SAT

estas unika provo, bilde esprimi nian idealon. En la korespondado kun varbotoj tiuj kartoj estos tre utilaj al vi. Tial aĉetu ilin ĉe la **Administrejo de SAT,** R. Lerchner, Colmstr. 1, **Leipzig O 27.** La kompleta serio, konsistanta el 5 diversaj kartoj, kostas **0,50** g. mk.

ENHAVO:

	pago
Kiel aspektas en Ĉinio la virina movado	335—36
El Ameriko	336
La dramo de l' Norda Poluso	336
Pri sufiĉe fama historia Manifesto	337
Infansklaveco en Persio	337
Jaŝasun	337—38
Tago el mia vivo	338
Kiel metilernanto en AEG	338
Tra Esperantio	339—42
Korespondado	342

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)